Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 3-a de Aprilo 2017

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Matilda Landaŭ, Ŝlomo Ŝaĥar, Gabi Zeevi. Gasto (part-tempe): Lea Kudevitzki

Protokolo de la antaŭa kunsido (6-a de Marto 2017- laŭtlegata) – komentoj, kontrolo pri plenumado

1. La 18-a Israela Kongreso, 2017, Aŝkelon (Amri)

a) **Raporto**: Amri sendis raporton pri la IK, kun fotoj al la membroj al la UEA-listoj, kaj al Esperanto-revuo, kiu aperigos ĝin en Kalejdoskopo en la maja n-ro.
b) **AK** - 26-30/4, partoprenis plentempe 4 eksterlandanoj, + Edgar kiu partoprenis nur la 29-30/3. Ĉiĉeronis Amri.
c) **PK** - 2-4.4 kun 2 eksterlandanoj, 2 israelanoj (Yael kaj Avigail). Ĉiceronis Jehoŝua 2-3/4, Amri 4/4-an, kaj aldone Mikaelon en Jerusalemo 5/4.
d) **Financoj** - Amri sendis al Ŝlomo detalan financan raporton.
IK - Al la hotelo ĉiuj pagis mem, krom la kantistoj Edgar, Mikaelo kaj Ŝoŝja, por kiuj pagis ELI. La hotelo ne subtraĥis la antaŭpagon (50 eŭro). Amri repagis la antaŭpagon al Andreas kaj Dan, kaj al Edgar 200 eŭrojn por la flugbileto. Edgar cetere ne pagis por la AK.
e) **Financoj AK** - Amri pagis ĉiujn elspezojn el la AK-kotizoj. Sekve la AK-antaŭpagoj (Heinz kaj Dan, sume 100 eŭroj) pagitaj al la UEA-konto de ELI devas reiri al Amri.
f) **Financoj PK** - Heinz pagas 200 eurojn: 300-la antaŭpagojn (50IK+50PK). Mikaelo senpage (ELI). Yael kaj Avigail pagas por si mem. Ĉiĉeronado: 500 NIS po tage.
g) Sume: IK – 5534 NIS, AK- 3850 NIS, PK – 3200 NIS.
h) Konkludoj: por estonte ekvilibrigi la buĝeton: preni 100 NIS IK-programkoston, plialtigi la AK- kaj PK-kotizojn se estas malpli ol 6 aŭ 3 partoprenantoj, respektive.

2. Financoj (Ŝlomo)

a) Raporto (letero de Ŝlomo). Li kontaktis 36 filiojn de Bank Hapoalim, 26 filiojn de Bank Leumi. La plimulto ne reagis, aŭ ne pruntas al asocioj. Kun 5 ankoraŭ ni negocas. Sed ili postulas enorme multajn burokratiajn dokumentojn. Jehoŝua: ni devas turni al Mizraĥi-Tfaĥot, ĉar ili promesas prunti al ĉiuj.
b) Oficejo. - Ŝlomo: sendis detalajn priskribojn pri unu, por ekzemplo.
c) Pagoj por WIZO: klubejo, ne okazintaj renkontiĝoj. En aprilo ekzemple estos nur du. Miĥal raportos al S-ro Efrati kaj al la klubanoj.

2/...

ĉ) Kvitancoj por membrokotizoj (Amri): oni nepre devas doni kvitancon tuj kaj surloke, kiam oni pagas, ankaŭ la membroj postulas tion. **Decido**: kiam oni pagas al Ŝlomo aŭ al Jehoŝua, ili reciproke sciigos kaj markos en siaj listoj pri la pagintoj. Ŝlomo sendos rete la kvitancojn, al tiuj kiuj ne ricevis. Dum la eventoj (ZV, LK, ktp) Jehoŝua ricevos la pagojn, kaj Lea kaj Gabi volontulas sidi apud li kaj plenigi/transdoni la kvitancojn.
d) Membro-kotizoj. Kiel instigi ne-pagantajn membrojn? Amri: dum la IK ni proponis aŭ pagi la ĉi-jaran kotizon (100 NIS), aŭ pagi la kongresan programon (150 NIS), kiun membroj pagintaj por 2017 ne pagas. 8 personoj pagis surloke. Ni devas memorigi la kotizpagon dum ĉiu E-a evento!

3. Israela E-isto (Amri)

a) Amri pretigis IE-162/163, duoblan n-ron (vintro 2016/printempo 2017), sur 48 paĝoj, ĝi estis presita en 200 ekzempleroj, kaj disdonita dum la IK.
b) Simbola kompenco por la provlegantoj - Eldad kaj Gabi. Matilda proponis lastfoje po 300 NIS, nun akceptita unuanime. (trifoja tralegado kaj korektado, ĉ. dekhora laboro entute, en kelkaj tagoj)
c) Por la redaktoro - laŭ antaŭa decido 1000 NIS por n-ro. Por la duobla n-ro Amri kaj la provlegantoj pretas ricevi kiel por ordinara n-ro, do nur 1000, respektive 300 NIS.

4. Libroj

a) Tali alportis al UEA 5 ekzemplerojn de la Memorlibro pri Josi Ŝemer.
b) Samtempe Tali aĉetis por ELI 3 ekzemplerojn de la Eta Princo.
c) Por komuna mendo de la nova libro "Bridge of Words" Amri trovis malmultekostan oferton kaj sendis alvokon en la ELI-listo. La reta prezo - $13-16 (+ sendokostoj, dividotaj inter la mendintoj). Venis nur tri petoj: Jehoŝua, Ŝaul Ĥasid kaj Ora Maŝiaĥ (or5708@gmail). Jagil proponis fari grupan mendon.

5. Dratverejo -38 תמא

a) Eran ricevis la raporton de nia advokato - 10 paĝa. Ni petu koncizan resumon.
b) Eran, laŭ rekomendo de la advokato, konsilas farbi kaj plibonigi la loĝejon por pli alta takso de la valor-taksisto (שמאי)? Ni petu de Eran klarigi, kiel tio influos nian kompencon.

6. Estontaj IK-j: 2018 - Akko? Karmiel? Cfat? Ramla? – proponoj bonvenaj!

Amri: 2019 (la 20-a IK!) – eble Eilat, 4-5 taga, el ili 2 tagoj en Jordanio, kune kun la 12-a MK!!

La venonta kunsido: lunde, la 8-an de Majo 2017, je 19:45

Protokolis: Gabi Zeevi